

Johann Wolfgang von Goethe,
Glückliche Fahrt

Die Nebel zerreißen,
Der Himmel ist helle,
Und Äolus löset
Das ängstliche Band.
Es säuseln die Winde,
Es rührt sich der Schiffer.
Geschwinde! Geschwinde!
Es teilt sich die Welle,
Es naht sich die Ferne;
Schon seh ich das Land!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).*

Arg-268-540 (2004-09-09 09:10:37)

Johann Wolfgang von Goethe,
Feliĉa veturo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Rompiĝas nebuloj
Sub hela ĉielo,
La timan ligilon
Malligas Eol'.
Susuras la ventoj,
Ekagas ŝipistoj.
Rapide! Rapide!
Disiĝas la ondoj
Kaj alproksimiĝas
La ŝip' al la land'!

*Traduko de la Germana poemo "Glückliche Fahrt" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-10-13.*

MR.-102-2 / Arg-268-541 (2004-09-09 09:12:59)

Johann Wolfgang von Goethe,
Feliĉa veturo

tradukita de Wilhelm Barnickel

Nebul' disŝiriĝas,
Ĉielo heliĝas.
La timan ligilon
Malnodas Eol'.
Susuras la ventoj,
Ekagas ŝipistoj.
Rapidu! Rapidu!
La ondoj partiĝas,
La for' proksimiĝas.
Vidiĝas la land'.²

*Traduko de la Germana poemo "Glückliche Fahrt" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILHELM BARNICKEL (*1921-09-02) en 1983.*

Arg-268-544 (2013-07-20 12:20:36)

Tiun ĉi poem-tradukon sendis al mi, Manfred Retzlaff, en 1984 mia fervojista kolego Willi Barnickel (Tiroler Str. 12b, D-60596 Frankfurt am Main, Germanujo). La lastan linion de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 pliiĝustigi; ĉar s-ro Barnickel erare neglektis, ke post la vorto "vidas" oni devus uzi la akuzativan formon "landon". Kaj la akuzativa finaĵo "-on" ne estas elizebla (ellasebla).

²Sinjoro Barnickel origine skribis:
Jam vidas mi land'.
(Sed tie mankas la akuzativa formo "landon".)